

# Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

## Ni ekskursu en *Ŝikinomori-Parko*

En la 1a de aprilo (lundo), ni povos apreci sakurojn kaj aliajn florojn en *Ŝikinomori-Parko* (Legu eseon en p.3). Ekskursontoj kolektiĝu antaŭ la Stacio Nakayama je la 11-a!

### Okazis

([KK]=nia kutima kunvenejo, nome Kanagawa-Kenmin-Senta, proksime de la Stacidomo Jokohama)

#### \*feb. 16 [KK] Hama-Ronda Vespero:

libera diskuto, kun 13 partoprenantoj.

(1) Kiajn Hama-Rondajn Vesperojn ni havu en tiu ĉi jaro.

(2) Ideoŝprucado<sup>(\*)</sup> pri "Kiel disvastigi Esperanton"

(\*)= (anglalingve) *brain storming*: diskutado por prezenti multajn opiniojn libere. Dum tio, kritikado/neado de la opinioj de aliaj parolantoj estas ne permesataj.

### Niaj Planoj

#### \* mar. 19 [KK] Hama-Ronda Vespero

Pri la landoj de la planataj kongresoj: Vjetnamio, en kiu okazos la 9-a Azia-Oceania Kongreso en la venonta aprilo, kaj Finnlando, en kiu okazos la 104-a Universala Kongreso en la venonta julio.

\*apr. 6 - maj. 18 (sed ne en maj. 4) [KK] Rudimenta kurso de Esperanto, en 6 fojoj. Gvidos Fuse Kentaro.

#### \*apr. 20 [KK] Hama-Ronda Vespero

Esperanto el la vidpunkto de junuloj parolos s-ro Miyazaki Gaku, de Japania Esperantista Junularo (JEJ), kaj pri la 100-jariĝo de Japania Esperanto-Instituto parolos Suzuki Keiichiro.

### Niaj klasoj kaj kursoj

Okazas jenaj klasoj (kutime en [KK])

#### \*Regulaj Klasoj en sabato

(1) Klaso "Eseoj", por legi "Tamen ĝi moviĝas!" gvidate de Doi Hirokaz

(2) Jokohama Salono. 2 fojojn monate oni legas "Mondo de travivaĵoj" de Tibor Sekelj, 1 fojon – libera verkado; kaj alian fojon – tradukado laŭ sia plaĉa fonto.

#### \*Regulaj Klasoj en merkredo

(1) Klaso "Belĉielo", por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", gvidate de Doi Ĉieko

(2) Klaso "eriko", por legi "Utila Estas Aliĝo" gvidate de Doi Ĉieko

#### \*Neregula Klaso

Klaso "Belflora": por legi "Kuniberto kaj Kilevamba", per la gvido de Doi Ĉieko, du fojojn monate

### Al la eksterlandaj abonantoj pere de papera poŝto!

Se vi konsentas, ni sendos al vi tiun ĉi organon retroŝte de la venonta numero.

Fakte, vi povas vidi fotojn kolore, anstataŭ nigrablanke en papera formato.

Informu vian retadreson al

tamtamo@googlegroups.com

dankon!

La Redaktoro

---

---

## Eseoj

---

---

# Konceptoj "Maldekstra" kaj "Dekstra"

Namba Fumiharu

### 1. Dum la ekzercado de Tokipono

Lastatempe, mi havas intereson al nova artefarita lingvo Tokipono ("toki pona" en Tokipono). Ĝi estas ne internacia lingvo sed minimumisma provlingvo, kiu havas nur 120 vortoj en oficiala vortaro!

Tokipono fokusas simplan kaj fundamentan pensmanieron. La uzantoj de Tokipono provas maksimuman esprimon per tiu minimuma vortaro. Fakte, mi ofte trovas interesajn aferojn kaj amindajn pensmanierojn dum la uzado de tiu lingvo. Jen estas unu el tiuj aferoj kiujn Tokipono donis al mi.

Iutage, kiam mi estis en la trajno de Tokaido-linio, mi provis traduki anoncon en trajno. Jen estas "次は横浜です。お出口は右側です" (La sekvanta stacio estas Jokohamo. Elirejo estas ĉe dekstra flanko)

Kaj... mi subite ekkonis ke... en Tokipono ne estas vortoj por "dekstra" nek "maldekstra"!

### 2. Malfacileco pri maldekstra/dekstra

Ja, certe ne estas vortoj "maldekstra/dekstra" en tiu minimumisma lingvo.

Ĝi havas nur 120 vortojn, kaj mi jam scias ĉiujn vortojn (vere ĉiujn, ĉar nur 120). Tamen mi ne povis rememori la taŭgajn vortojn. Ĉu s-ino Sonja (kreinto de Tokipono) forgesis prepari ilin? Tamen aliaj vortoj por montri direkton ekzistas sufiĉe, ekzemple *sinpin*(antaŭa), *sewi*(supra), *poka*(flanka) ktp.

Per saĝtelefono, mi tuj serĉis en reta forumo pri Tokipono. Ja, jam tokiponistoj multe diskutis pri tiu temo kaj proponis kelkajn manierojn por esprimi direkton. Jen estas ekzemploj por dekstra: "flanko de lerta mano", "male de flanko de koro (organo)", "flanko de fino de skribado"... Kompreneble, tiuj manieroj ĉiuj havas problemojn. En la mondo estas ne malmultaj "maldekstramanuloj". Treege rare sed certe ekzistas homoj kiuj havas koron en dekstra flanko. (Ekz: S-ro Nakauti Isao, la fondinto de fama superbazaro Daiei, havis koron dekstre) Direkto de skribo? Multaj lingvoj (kiel la

araba, la hebrea ktp.) estas skribitaj de dekstre maldekstren!

Jen, tiakaze mi subite alfrontis malfacilan sed interesan temon. "Kio estas dekstra? Kio estas maldekstra? Kiel oni povas distingi ilin pli precize?"

### 3. Penso pri la problemo

Fakte, tiu koncepto pri maldekstreco/dekstreco havas multajn problemojn.

Unue, tiu maniero por montri direkton estas tute subjektiva. Ekzemple se vi diras al okulisto "Mi havas doloron ĉe mia dekstra okulo!", kiu okulo estas ĝi? Tiu okulo estas dekstra por vi, tamen ĝi estas maldekstra por la okulisto, kiu frontas al vi. Ja, tiu situacio povas kaŭzi konfuzon kaj miskomprenon.

Pli serioza problemo troviĝas rilate al homoj kiuj havas malkapablon de "maldekstra/dekstra konfuzo". Ili malfaciliĝas senti kaj distingi maldekstrecon kaj dekstrecon. Se iu diras al ili "Iru dekstren!", ili ĉiam devas fari tiel, "Dekstra... kiuflanke...? Ho, la flanko de krajono!" por rememori la flankon. Por ilia oportuneco, kion ni povas fari?

Aliflanke, en la mondo estas tre unikaj lingvoj kiuj ne havas vortojn nek koncepton pri maldekstra/dekstra. Ekzemple, unu el aŭstraliaj aborigenaj lingvoj "Guugu Yimidhirr" uzas vortojn kiel "norda", "suda", "okcidenta" kaj "orienta" por montri direkton. Tiu maniero povas evitigi miskomprenon.

Pensinte tiel, mi ekpensis iun hipotezon pri la vortoj en Esperanto...

### 4. Mia aĉa hipotezo kaj serioza propono pri tiuj vortoj

Kial la vorto "dekstra" estas tiel longa en Esperanto? En aliaj lingvoj la vorto estas pli mallonga. Ekzemple "right", "droit", "destra", "migi" ktp. Se la vorto estus pli mallonga, ekzemple kiel "deka", "dekso", aŭ almenaŭ "destra", ni povus montri direkton pli facile... Krome, ni uzas prepozicion "mal-" por la alia

direkto. Kaj rezulte la vorto "maldekstra" plu longiĝas ol "dekstra".

Pro tio... Jen estas mia hipotezo; ĉu la kreinto de tiu lingvo, d-ro Zamenhof, ankaŭ sentis problemon pri "maldekstra/dekstra"? Tial li intence longigis tiujn vortojn por evitigi, aŭ almenaŭ malmultigi la uzadon de la vortoj...

La hipotezon subtenus jena fakto: la fako de d-ro Zamenhof estis okulisto! Supozeble li ĉiutage alfrontis la problemon kiam li rigardis

okulojn de klientoj.

Nu... Eĉ se ĝi estas nur mia aĉa ŝerco, estas eble plibone ke ni malmultigu la uzadon de tiuj vortoj. En Tokipono, s-ino Sonja kaj tokiponistoj plu draste provas malmultigi; ja malestigi la vortojn!

Ĉu vi provu ekzercon? Ekzemple, kiam vi gvidas alian personon en kvartalo, ĉu vi povas klarigi la vojon sen la vortoj "maldekstra/dekstra" ?

## Pretiĝo por la printempo — en *Ŝikinomori*-Parko

AKIYA Hideo

Nur du monatojn antaŭe ni festis la novan jaron, kaj en frua februaro jam alvenis la tago de printempiĝo laŭ kalendaro, kvankam la vetero ankoraŭ restis tre malvarma. En la frosta vintra vento oni sopiris al pli varma aero, esperis ties tujan alvenon, kaj nun en la frua marto ni konvinkiĝas, ke ĉio estas preta por la tempo de florado.

Iom post iomoftiĝas tiaj tagoj, kiam ni ricevas pli fortan sunradion, kiu alportas varman printempan aeron. Tiam ni ekrimarkas ĝermojn de floroj ĉe arbobranĉoj kaj en florejoj.

Al najbara trajnstacio mi kutime piediras ĉirkaŭ 25 minutojn laŭ la plej mallonga vojo. Tamen fojfoje, eble en ĉiu tria tago, mi ĉirkaŭiras por sano sur pli longa vojo tra la granda parko de "*Ŝikinomori* (Kvar-sezona Arbaro)." Laŭ la lasta irvojo necesas ĉirkaŭ unu horo al mi atingi la stacion, ĝuante la belajn pejzaĝojn en la parko.

Survoje al la parko troviĝas alia zono kun ankaŭ belaj pejzaĝoj nomata "*Sato-yama Garden* (Ĝardeno de apudvilaĝa-monteto)." La ĝardeno situas inter du ampleksaj zonoj, *Ŝikinomori*-parko kaj "*Zoorasia*, Jokohama-bestoĝardeno."

En la fino de januaro mi jam vidis floradon de kolzoj, kiuj viciĝas laŭ promenejo en *Sato-yama Garden* (foto 1, 2019). Tie ankaŭ ĉi-jare same kiel pasintjare okazos la flor-festivalo "Ĝardenkolĉeno Jakohama 2019" en la daŭro de la 23-a, marto ĝis la 6-a, majo. Mi supozas, ke oni nun fervore laboras por la festivalo zorge kreskigi plantidojn en granda florejo etendanta sur vasta deklivo. Dum la evento, la florejo kun abundaj diverskoloraj floroj allogas multajn spektantojn junajn, maljunajn (foto 2, estinta evento, apr. 2018).

En *Ŝikinomori*-parko en februaro jam floras vaksprunoj kun flavaj malgrandaj petaloj (foto 3,



Foto 1



Foto 2



febr. 2019). Kaj poste sakuroj florados probable dum la fino de marto kaj la komenco de aprilo (foto 4, apr. 2018). Oni povas ĝui plenan floradon de la sakuro “*Somei-joŝino*” en tiu semajno, kaj ankaŭ alia speco de sakuro “*Jamazakura*” daŭre floras pli longe.

Ŝanĝiĝo de sezonoj okazas regule ĉiujare, kaj laŭ tio ankaŭ sento de homoj ŝanĝiĝas.



Foto 3



Foto 4

Sed lastatempe mi fojfoje trovas, ke mi iom malfruiĝas al la tempofluo. Tempo flugas kiel sago, oni diras. Do, mi devas rigardi ĉion en la naturo pli atente, kaj volas gustumi sufiĉe tion. Sed antaŭ ĉio mi pretiĝu kontraŭ polenozo, kiu ĝenas min en ĉi tiu tempo ĉiujare, delonge preskaŭ duonjarcenton.

## Ĉu kazino en Jokohamo?

Sibayama Zyun'iti

En julio 2018, la leĝo pri “Integrata Ripozejo” estis legitimita en Japanio post plurjara rezisto de la opoziciaj partioj. (Ĉi tie, “ripozejo” estas mia esperantigo de la angla-devena vorto “*resort*” kiu povas esti tradukita kiel “feriado”, sed mi nun uzas literon samkomencan al la angla R. En la japana: 統合リゾート).

Tiu Integrata Ripozejo (IR) inkluzivas internaciskalan komplekson de ekspoziciejo, konferencejo, teatro, vendoplaco, hotelo, k.t.p. plus kazino, t.e. vetludejo de mono per ludoj kiel ruleto, pokero. Se oni ekskluzivas kazinon, la proksiman bildon oni vidas en nuna Minato-Mirai, kie la 92-a UK okazis.

Se nur tiel estus, ne estus kialo rezisti la legitimadon. La ĉefa problemo estas je tiu pluso, “kazino”.

En Japanio, “vetludo” estas laŭleĝa nur en strikte difinitaj publikaj teritorioj kiel ĉevala vetkuro, motorboata vetkuro, kaj tiu IR-leĝo escepte laŭleĝigas vetludon en specialaj teritorioj permesitaj kiel IR-ejo.

Jam en la mondo estas multaj IR-ejoj, kiel Las-

Vegas en Usono kaj Makao. Tie ĝenerale, nur malpli ol 10-ono de la terspaco estas uzata por vetludejoj, sed tia malgranda spaco naskas 80 ĝis 90 procentojn de la tuta profito de la IR-ejo. Do kazino gajnas. Sed de kiuj gajnas la kazino? Nome de la vetludantoj! Malmultego de la vetludantoj eble gajnos, sed multego malgajnas!

Pro tio multaj japanoj kontraŭas la permesigon de eĉ laŭleĝaj kazinoj, do la IR-leĝon, sed ĝi jam estis akceptita. Estas pluraj kialoj por kontraŭi. Unu el ili estas, ke homo iĝos malsanece mania al vetludo, eĉ perdante sian tutan havaĵon. Alia estas la timo, ke kontraŭleĝuloj, gangsteroj havos potencon kaj minacos ĉirkaŭulojn. La registaro diras, ke la leĝo bone zorgas pri tiaj malbonoj, sed kontraŭuloj ne facile kredas je tio.

Nu, la leĝo invitas urbajn instancojn inviti la IR-ejojn, kiuj ekzistu nur kelkaj en Japanio. Kaj nia municipo Jokohamo laŭdire havas fortan intereson pri tio. La loko nomata *Jamaŝita*-havendistrikto, okcidente de la Parko *Jamaŝita* estas la planata loko.